

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Aprilo 2018

(50a jaro)


N-ro 177

Esperanto Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



Du E-poŝtmarkoj kun SERVO PER AMIKECO
el Rumanio (2016)



27. 04 1937 – 04 01 2018

Komence de la nova jaro 2018a, forlasis ĉi mondon neforgesebla kaj neforgesenda Amiko, altnivela esperantisto kaj eminenta esploranto pri la Esperanto-Movado. Mi kredas, ke al ĉiu el vi lia nomo estas konata kaj certe vi scias, kia persono li estis: pacienca kaj nelacigebla elserĉisto pri ĉio kio rilatis Esperanton, kolektanto de esperantaĵoj, ĉefe de E-filatelaĵoj, posedanto de valorega hemeroteko esperanta, ekde la unuaj eldonjaroj de ĵurnaloj, revuoj, kaj krome de libroj, fotoj, dokumentoj. Danke al sia vasta kono priesperanta, li verkis multegajn artikolojn, kiuj estis publikigitaj en la plej gravaj gazetoj. Jean Amoureux kunlaboris kun historiistoj, bibliotekoj kaj muzeoj kaj laŭ historia vidpunkto reviziis/kontrolis/konsilis la plej imponajn verkojn aperintajn en nia medio, el kiuj elstaras la “Plena Verkaro de Zamenhof”, kompilita de Ludovikito (Itô Kanzi) kaj – plej laste – la “Historio de la esperanta literaturo”, de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer.

Li estis fidela membro de Elf-Arek de ĝia fondo kaj multfoje li kontribuis al la redaktado de LA VERDA LUPEO, per interesaj historiaj esperantaĵoj. Lia pago de membro-kotizo 2018 atingis la kasiston decembre 2017: ĉiam tre, tre akurata!

Kun li unuafoje mi konatiĝis dum la Montpeliera UK de Esperanto en 1998, sed famo pri li, kiel eminenta historiisto kaj kompetentega filatelisto, trakuradis jam delonge la tutan esperantan mondon, tial – kiam tute hazarde mi lin renkontis – mi sentis min tre honorata kaj feliĉa. Jean staris ĉe la poŝta ĝiĉeto, atendante ricevi la specialan stampon por siaj korespond-aĵoj. Mi estis novulino, li brila fakulo tiukampe. Probable mia evidenta embaraso tiklis lian bonvolemon kaj naturan afablecon, ĉar tuj li proponis al mi sian helpon por akiri bonkvalitajn stampojn. Post tio ni interparolis kaj kompreneble nia ĉefargumento estis la kolektado de esperantaĵoj. Ekde tiam ni fariĝis konstantaj korespondantoj kaj fine sinceraj amikoj. Neniam mi forgesos la du tagojn, kiujn mi pasigis en lia hejmo antaŭ tri jaroj. Tiam mi havis la plezuron ekkoni ankaŭ lian ĉarman edzinon, kiu ĉiam ameme subtenis lian poresperantan laboron.

Kiaj feliĉaj momentoj! Kiel bele ni pasigis tiun malmultan tempon (la du tagoj flugis rakete!) interparolante pri nia komuna ŝat- kaj viv-okupo: Esperanto kaj ties ĉi historio. La aero mem bonodoris je esperanto: ĉie en lia loĝejo – bonorde kaj abunde - troviĝis ĉiaspecaj Esperantaĵoj: temis pri bild- kaj poŝt-kartoj, pri poŝtmarkoj kaj glumarkoj, pri gazetoj kaj libroj, pri unikaj dokumentoj el la unuaj vivo-jaroj de nia lingvo. Kiel bele tuŝi – delikate kaj atenteme – tiujn malnovajn ĵurnalojn; lupee esplori la fotojn de Esperanto-pioniroj por rekoni la plej eminentajn; sinforgeze legi interesegeajn dokumentojn...; liaj okuloj briladis kiam li rakontadis historiaĵojn, ankaŭ ĉar li certis ke mia interesiĝo estis granda kaj sincera. Mi restis fascinata de li kaj plene ĝuis tiujn kunajn momentojn. Dankon pro via amikeco!

Via porĉiama admirantino Elda

Nia J.R.Piton skribis:

“Mi ĵus malkovris, ke la plej fama antropologo de la kuba historio okupiĝis pri Esperanto inter 1906 kaj 1910, kio kulminis en la fonda de la unua kuba landa asocio por Esperanto. Tial mi kompletigis la suban artikolon en Vikipedio, kiu tute ne menciis Esperanton en lia vivo.”

Fernando Ortiz naskiĝis en Havano kaj pasigis sian infanaĝon en Menorko en Hispanujo. En 1895 li revenis al Havano, kie li komencis studi juron. Li finis siajn studojn en Barcelono, Hispanujo, kaj doktoriĝis en Madrido.



Ortiz laboris en la diplomatia servo, estante konsulo en Korunjo, Ĝenevo kaj Marsejlo.

En 1906 li fariĝis advokato ĉe la kuba kontokortumo, en 1908 jurprofesoro en Havano, kie li instruis publikan juron, politikan ekonomion kaj konstitucian juron. En 1914 li estis kunfondinto de la kuba popoluniversitato. Ekde 1917 li estis dum dek jaroj delegito en la kuba parlamento por la Liberala Partio. En 1931 Fernando Ortiz serĉis azilon en Usono, pro sia aktivado kontraŭ la kuba diktatoro Gerardo Machado. En 1933, post la renverso de Machado, li revenis al Kubo. En 1949 li estis fonda prezidanto de la kuba pacmovado.

Pro liaj vojrompaj esploroj oni nomas Fernandon Ortiz ankaŭ „Tria Malkovrinto de Kubo“ (post Kristoforo Kolumbo kaj Alexander von Humboldt).

Fernando Ortiz estis ankaŭ kunfondinto de la dumonata revuo *Revista Bimestre Cubana*, de la Arĥivo por Kuba Popolarto kaj de *Estudios Afrocubanos*:

Unu el liaj lernintoj estas la kuba antropologo kaj verkisto Miguel Barnet, kiu nun direktas la *Fondaĵon Fernando Ortiz*.

Ortiz kaj Esperanto

Dum la junaĝo en Hispanio, Ortiz ekkonis Esperanton kaj je la reveno al Kubo li faris la propagandon, pionire. En marto 1906 li aperigis en la periodaĵo "El mundo ilustrado" (La ilustrita mondo) serion de artikoloj kun la titolo "El lenguaje universal" (La universala lingvo) sub la pseŭdonimo D-ro Novemo. Temas pri objektiva kaj bona prezentado de la lingvo al la publiko. Tiam li proponis fondi nacian societon por diskonigi la lingvon en Kubo, kun revuo nomata "Kuba Stelo". Fine en la ĉefurbo Havano fondiĝis la 1-an de januaro 1910 Sociedad Cubana para la Propaganda del Esperanto, kiu poste havis kiel organon la revuon "Latinamerika Esperantisto".



Valeri Kubasov Bertalan Farkas

Bertalan FARKAS [bertalan farkaŝ] naskiĝis la 2-an de aŭgusto 1949 en GYULAHÁZ A en Hungario. Li estas emerita piloto de la hungara armeo.

En 1980 li iĝis la unua hungara kosmonaŭto kaj la unua esperantisto kiu vizitis la kosmon. Per la kosmokapsulo Sojuz li atingis la kosmon kaj restis tie dum 7 tagoj, 20 horoj kaj 46 minutoj.

Tri jarojn antaŭe, la 5-an de Septembro 1977 startis de la kosmodromo Cape Canaveral la kosmoveturilo Voyager 1. Ĝi kunportas sur ora disko mesaĝon en Esperanto:

**“Ni strebas vivi en paco kun la popoloj de la tuta mondo, de la tuta kosmo”
fare de Ralph Harry.**

Ĝemela sondilo Voyager 2 kunportas saman salut-mesaĝon en 56 lingvoj.



Karlo E. Ciolkovski, kosmonaŭtika pioniro, Esperantisto



La 104-a Japano Esperanto-Kongreso okazis en la urbo Yokohama (Jokohamo) je la 3a, la 4a kaj la 5a de novembro 2017.

Aliĝis 459 kaj reale partoprenis 331 personoj. El ili partoprenis el: Suda Koreio -7, Germanio -4, Ĉinio -2, Aŭstrio -2, Francio -1, Vjetnamio -1, Filipino -1, Pollando -1, Hungario -1, Svedio -1, Anglio -2.

Pri E-filatelaĵoj lige kun la kongreso ni informos en nia sekva LVL.

Estas konata ĝis nun, nur tiu ĉi individua pm kun nominalo de 82 enoj, ricevita de nia prezidantino.





Francio

Pasintjare TAKE, en Francio, aperigis memore al la 100a mortodatreveno de Zamenhof individuon poŝtmarkon por eksterlanda (MONDE) afranko de dudekgrama letero.

Dankon al nia amiko Basso pro la sendita informo.



Ukrainio

Okaze de la sama evento aperis samjare en Ukrainio individuaj pm-oj kun Zamenhof-portreto kaj Zamenhof-monumento. Supozeble por enlanda afranko. Akompanaj klarigoj min ankoraŭ ne atingis, sed jam survoje de s-ro Niko Voloshin.

Do, espereble en nia sekva LVL vi ekscios pli.

Vagante tra la retpaĝoj de Internacia Polica Asocio mi trovis informojn pri eldono de E-temaj poŝtmarkoj kun la E-lingva slogano de IPA:

SERVO PER AMIKECO

Eldono: 24.08.2016

Grafikisto: Vlad Vamasescu

Preso: Ofseto

Koloroj: 4

Mezuroj: pm: 48x33, la ronda: 30 mm

Valoroj: 8 Lei, 15 Lei (ronda)



Unuataga koverto kun unuataga stampo de 24. 08. 2016





Pm 15 Lei kun E-lingva slogano SERVO PER AMIKECO

Asociația Internațională a Polițiștilor
Secția Română
20 de ani

1996 • SERVICII PRIN PRIETENIE • 2016

1950 • SERVO PER AMIKECO • 2016

International Police Association
66 Years /
66 National Sections

Diplôme d'affiliation internationale
Par le présent diplôme, il est attesté que la Section Roumaine, créée le 21 août 1992, est reconnue officiellement comme section nationale par l'Association internationale de police pour des privilèges et avantages de l'affiliation internationale à l'International Police Association et que la représentation au Conseil exécutif international lui est garantie.
Reconnaitre l'affiliation internationale assurée le 25 octobre 1996
Au sein du Comité national international de l'International Police Association
Le Président international
Le Secrétaire général international

25 octobre 1996
Affilierea internațională a Secției Române la I.P.A. /
25 October 1996
The International Affiliation of the Romanian Section to I.P.A.

Arthur Troop
Fondatorul I.P.A. / Founder - I.P.A.

Lista Țărilor Membre (Member Countries):

- MAREA BRITANIE
- OLANDA
- BELGIA
- FRANȚA
- NORVEGIA
- ELVEȚIA
- GERMANIA
- IRLANDA
- ITALIA
- SUEEDIA
- AUSTRIA
- FINLANDA
- HONG KONG (R.A.S.)
- CANADA
- SPANIA
- KENYA
- LUXEMBURG
- DANEMARCA
- S.U.A.
- BRAZILIA
- JAPONIA
- GIBRALTAR
- ISLANDIA
- ISRAEL
- MALTA
- ARGENTINA
- AUSTRALIA
- GRECIA
- NOUA ZEELANDA
- MAURITIUS
- SAN MARINO
- SRI LANKA
- PORTUGALIA
- MEXIC
- AFRICA DE SUD
- CIPRU
- PERU
- LESOTHO
- UNGARIA
- SLOVENIA
- POLONIA
- RUSIA
- BULGARIA
- CEHIA
- SLOVACIA
- MONACO
- SWAZILAND
- ESTONIA
- LETONIA
- LITUANIA
- ROMÂNIA
- UCRAINA
- TURCIA
- PAKISTAN
- CROAȚIA
- MOZAMBIK
- BOTSWANA
- ANDORRA
- SERBIA
- MACAO (R.A.S.)
- MOLDOVA
- BOSNIA ȘI HERCEGOVINA
- ARMENIA
- KAZAHSTAN
- MACEDONIA
- MUNTENEGRU

Bloko: 100x100 mm, kun ronda 15 Lei-pm, diametro 30 mm,
kaj portreto de Arthur Troop, fondinto de IPA



Folio „20 jaroj IPA- sekcio en Rumanio“, nominalo 8 Lei
En la emblemo: SERVO PER AMIKECO

Krome sube kaj supre talonoj en la foliorando
kun sama slogano. Vidu la sagojn.



Jam 2006 aperis en Rumanio
pm-bloko kun nominalo
de 8.70 Lei okaze de
10 jaroj rumana IPA-sekcio.
La slogano
SERVO PER AMIKECO
ne aperas en la pm sed en
la apuda memora emblemo.





Por la 21a Internacia Ekzekutiva Konsilia Konferenco de IPA en Adelaide
5 – 10 Oktobro 1986 la Poŝto Aŭstralio eldonis tutaĵo-koverton kun surprisita
36-cenda poŝtmarko. En la pm la IPA-emblemo kun la Esperantlingva devizo:

SERVO PER AMIKECO



50 jaroj Israela sekcio de I P A Eldonita 18 06 2012



**I) POŝTMARKOJ PRI ESPERANTO MOVADO, PRI DOKTORO ZAMENHOF
KAJ KUN ESPERANTAJ TEKSTOJ**

- 1988 CENT JAROJ DE INTERNACIA LINGVO ESPERANTO (JUGOSLAVIO)
- 1990 100 JAROJN ESPERANTO-MOVADO EN BULGARIO (BULGARIO)
75a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (KUBO)
- 1994 MONDKONGRESO DE IPA (LUKSEMBURGIO)
- 1997 UNUA KONGRESO DE KROATA ESPERANTISTA LIGO (KROATIO)
- 2001 86a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (KROATIO)
- 2005 90a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (LITOVIO)
- 2007 1887 ESPERANTO 2007 / L. L. ZAMENHOF 1859-1917 (ISRAELO)
- 2008 100 JAROJ UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (BOSNIO KAJ HERCEGOVINO)

II) TUTAĴOJ KUN ENPRESITAJ POŝTMARKOJ PRI ESPERANTO-MOVADO

- 1990 ESPERANTO KONGRESO, poŝtkarto (HUNGARIO)
- 1994 79a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, poŝtkarto (KOREA RESPUBLIKO)
- 1995 47a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO, poŝtkarto (HUNGARIO)
- 1998 71a INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO / ODESŬ, koŝtkarto (UKRAINIO)
- 2008 100 JAROJ DE ESPERANTO EN KROATIO, poŝtkarto (KROATIO)
- 2009 LA 150a NASKIĜDATREVENO DE ZAMENHOF, LA KREINTO DE ESPERANTO,
poŝtkarto (POLLANDO)

III) POŝTMARKOJ KUN ESPERANTAJ TALONOJ

- 1988 TUTMONDA EKSPŬZICIO DE POŝTMARKOJ PRAGO 1988 (ĈEĤOSLOVAKIO)
- 2000 VIVU 2000 (BRAZILO)

IV. PROVPRESOJ kaj SPECIMENOJ

- 1954 50 JAROJ ESPERANTO-MOVADO EN AŬSTRIO, provpreso (AŬSTRIO)

Certe nia amiko SONG intertempe pretigis daŭrigon de ĉi suplemento.
Se ni ricevos, tuj ni plu peros al vi.



Jen nia SONG. Li apartenas al la estraro de provinca filatela asocio.

Bedaŭrinde miaj du SONG-katalogoj antaŭ jaroj malaperis el mia loĝejo.

ESPERANTO-ĈINA FILATELA TERMINARO

Kompilis Song Shengtan

A

aĉetpropono 出价, 投标

adresita 实寄的

adresloko 目的地, 寄达地址, 地址书写处

aera etikedo 航空签条

aera marko 航空邮票

aero-filatelo 航空集邮

aerogramo 航空邮筒

aerogramo-tutaĵo 航空邮资邮筒

Jam en la jaro 2009 nia kluba amiko SONG Shengtan pretigis 9-paĝan Esperanto-Ĉinan Filatelan Terminaron.

Iel okazis ke mi ĝin tute forgesis. Ĝi ekzistas sole en cifereca versio.

Nun mi hazarde ĝin retrovis en la komputilo.

Al interesuloj volonte mi kopie ĝin sendos retpoŝte.



Jen la unua E-tema loterio-bileto el la jaro 1918. Ĝi montras la emblemon de la Esperanta Societo Paco kaj Amo, fondita 1914. Valoro: 1 peseto. Biletposedanto estis s-ano Francisko Alsina. La kopion sendis nia karmemora Jean Amouroux antaŭ jardekoj.

Li kolektis tiujn biletojn kaj zorge konservis. Antaŭ pluraj jaroj li donacis al nia prezidantino kelkajn, kaj tial ni iujn povas montri. Eble iu el niaj kolegoj en Hispanio ankaŭ konservis ilin kaj povas informi pri ili, kun kopioj.

Ja temas pri Esperantaĵoj.



1987



1967



2017



1997

Poŝtmarko-tenilo – Kadromarko

Ni ĉiuj jam renkontis tiujn glumarkojn sur malnovaj kaj eĉ novtempaj korespondaĵoj. Nun ekestis la demando, kiel nomi tiujn markojn kiuj servis por surglui poŝtmarkojn. Niaj kadromarkoj servis por propagandi Esperanton. Mi vidis kelkajn eldonitajn eble de UEA.

Sed bedaŭrinde ignoris tiujn, ĉar temas pri nedatumitaj markoj.

Kaj nun eĉ ne unu pecon mi trovas en miaj letermontoj.

Ni direktis la problemon al nia


James Rezende Piton. Li trovis solvon, ĉar li konis ilin kiel „porte timbre“ en la franca kaj proponis „kadromarko“-n, anstataŭ „poŝtmarko-tenilo“. Bona solvo!

Ili troveblas franclingve amase en ret-aŭkcioj!



Ni prezentas sube bildon de uzita peco, ricevitan de Maurice Caron, sur koverta sendita de la fama Edmond Privat el Geneve en Svislando.





Pu'er Teo Esperanto, Ĉinio



Cigaretskatolo el Hungario





Centjariĝo de Esperanto en Oradea, Rumanio, 1910 – 2010

En majo 2010 la loka klubo festis sian centjariĝon. Post multjara paŭzo ĝi estis refondita en januaro 1990. En julio 2003 en la urbo okazis Internacia kongreso de UMEA. Pri ĝi memorigas poŝta E-stampo. De la memorstampo mi ricevis kelkajn pecojn de d-ro Nietzsche el mia urbo, kiu tie partoprenis.

Tiutempe estris la klubon s-ano Budahazy Istvan.

Nun vagante tra la reto mi renkontis kopion de porokaza glumarko-folio pri la evento. Mi konfesas, ke mi nur supozas, ke estas glumarko. Eble vi posedas ĝin en originalo, se jes, ni devus ĝin noti en nian glumarko-katalogon.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto:

ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.



Koran dankon al vi, kiu jam ordigis vian kotizon 2018!
Se vi estos en la Universala Kongreso Lisbono, venu al la
Movada Foiro kaj al nia Faka Kunveno.

Mi ĝojus renkonti vin!

Via Elda

